


**Bildo 1**: *Günther* SCHAUMBERG, Kreskado (*Wachstum*), 1997



## Laŭdado

### Du 80-jaruloj inter niaj aŭtoroj

Krom la okdekjariĝo de nia ŝatata aktivulo *Josef Kavka*, pri kiu ni jubilis en la antaŭa kajero SR 2/2002, malkaŝis sin du pliaj jubileuloj inter niaj membroj aŭtoroj, por kiuj tiu ĉi jaro estas grava festojaro: Brito kaj Germano, kiuj, spite de la fakto, ke ili vole aŭ nevole kiel junaj viroj ekde la komenco de mortiga dua mondmilito devis soldatiĝi – kaj tamen (kaj tio estas por mi ĉiam denove miraklo) transvivis terurajn jarojn de milita hombuĉado...

#### *Wilfrid G. Atkinson*

Mi lin renkontis la unuan fojon dum la Brita Esperanto Kongreso en *Chester* antaŭ 4 jaroj, kaj li tuj estis preta, helpi kaj subteni min cele de revivigo kaj revigligo de la brita sekcio de ISAE.

*Wilf Aikinson* naskiĝis en suda Anglio la 20an de februaro 1922. Kiel infano li vivis trankvile en apudmara urbeto. Li nomiĝis *Wilfrid* pro onklo mortigita en la unua mondmilito. Eble pro tio li lernis malami militon, kaj junaĝe konsterniĝis pri la minaco de dua mondmilito. Li ne iris rekte al universitato sed 16-jaraĝa iĝis laŭleĝa lernanto (dum tri jaroj) en oficejo de la urba inĝeniero en la historia katedralurbo *Salisbury*. Dum tiu tempo li studis pri inĝenieraj temoj (kaj hejme kaj partatempe en *University College, Southampton)*. Tiel li akiris la unuan parton de ekstera diplomo de Londona Universitato.

Por plu studi *Atkinson* devis "iom atendi" ĉar okazis interrompo (malfortuna sorto de la viroj naskiĝintaj en 1922): en la jaro 1942 la milito ankoraŭ furiozis kaj, spite kelkajn konscienc-riproĉojn, li soldatiĝis. En 1944 oni sendis lin al Hindio. En 1945, ĝuste antaŭ la anonco pri la du atombombaj eksplodoj, li enhospitaliĝis pro poliomjelito. Tio kaŭzis paralizon de la dekstra gambo kaj post kelkaj monatoj oni resendis lin hospitalŝipe al la patrolando. En 1946 li reiris al *Southampton* por daŭrigi la studadon dum unu jaro por la fina parto de sia inĝeniera diplomo. Sekvis interesa inĝenierprofesia longa vivo kaj laboro kun membreco ĉe *MICE* (*Member of the Instituion of Civil Engineers*) ĝis la emeritiĝo en 1985.

Pli gravas ja por ni internacilingvaj ISAE-membroj la Atkinsona Esperanto-vivo! Jam dum li baraktis kiel lernejano kun la komplikaĵoj de la latina gramatiko, juna *Wilfrid* aŭdis de sia patrino pri Espe-

ranto – kaj tiu lingvo ŝajnis "bona ideo". En 1940 li mendis en butiko libron pri Esperanto kaj komencis studi ĝin – ne sciante ĉu ankoraŭ vivas iu, kiu ĝin parolas. Sed la reguleco de la lingvo allogis lin kaj li daŭrigis la hejmstudadon.

En 1947 li kun ĝojo partoprenis en Berno sian unuan Universalan Kongreson, kio konfirmis lian kredon pri la unika valoro de Esperanto. Li poste partoprenis UK-ojn en *Malmö* (1948) kaj *Bournemouth* (1949). Dum tiu lasta li renkontis sian estontan edzinon, *Valerie Aston*, al kiu li edziĝis en 1953. Tiam ili laboris en *Wimbledon* kaj ambaŭ aliĝis al la Londona Esperanto-Klubo. Tie *Wilf* profitis el ĝia tradicio, tiom ofte kiom eble paroli esperante: dum la jaroj li oficis dufoje kiel prezidanto kaj dum multaj jaroj kiel sekretario. Li ne nur multfoje prelegis pri tre diversaj temoj, sed ankaŭ transprenis gvidadon de la Londona Esperanto-ĥoro dum pluraj jaroj. *Atkinson* aktivis en la Londona Klubo (en kiuj li kaj lia edzino nun estas Honoraj Vicprezidantoj) ĝis la jaro 2000, kiam nova malsano malebligis ĉeeston en kunvenoj. En la Londona Klubo, *Wilfrid* konatiĝis kun s-ro *R.A.M. Kearney*, kiu dum preskaŭ la tuta vivo havis grandan intereson kaj originalajn interpretojn pri la relativeco de *Einstein*.

Post la morto de *Kearney* en 1967, *Atkinson* esperis verki en Esperanto klerigan libron (kun multaj laŭskalaj diagramoj) surbaze de la ideoj de *Kearney*. Sed, ho ve, ĝuste post emeritiĝo en 1985 oni kaptis lin kiel sekretario de la loka komitato por organizi la UK-on en *Brighton* 1989. Tio kaj multaj aliaj "pensiulaj devigoj" rezultiĝis, ke eĉ ĝis nun li kapablis verki nur duonon de la projektita eta libro. Tamen, li almenaŭ publikigis du mallongajn artikolojn pri sia "iam plenigota entrepreno" en Scienca Revuo...

En liberaj horoj nia kara longjara ISAE-membro ludas pianon kaj aŭskultas klasikan muzikon. Kaj dum ferioj, plaĉas al li sidi subĉiele kaj skizi tion, kion li vidas. Kiu el lia idaro estas heredinta iom de la muzikeco kaj pentradarteco de la patro respektive avo? El liaj tri gefiloj kaj sep genepoj **almenaŭ du estas anoj de Esperantokluboj**!


Nome de la estraro kaj komitato de ISAE mi deziras al nia fidela membro *Wilfrid Garrett Atkinson* ankoraŭ multajn ĝojoplenajn vivojarojn - kaj sukceson en la de li kaj lia edzino multe ŝatata ludado de la populara surtabula krucvortaĵo "*Scrabble*"!

*R. Sachs*, ISAE-prezidanto




***Günther Schaumberg***

Naskiĝinta je la 28a de junio 1922 en *Eschwege* /Germanio li estis 17-jaraĝa kiam eksplodis la dua mondmilito. Post la abiturienta ekzameno 1940 en lia naskiĝurbo li militservis ĝis 1945 kaj postvivis kelkajn tre severajn vundiĝojn. La malfacilan postmilitan tempon en Germanujo li sukcese trapasis kaj postvivis kiel « libera artisto » antaŭ ol li estis allasata por la studo de arto ĉe la Verk-Akademio en la nordheslanda regurbo *Kassel* de 1953 ĝis 1957. Poste li fariĝis instruisto por arto ĉe Eŝvega gimnazio de 1959 ĝis 1984. Dum tiu tempo li okazigis ekspoziciojn de siaj verkaĵoj en Eŝvego, Kaselo kaj Oldenburgo, kaj partoprenis ĉe kulturhistoriaj kaj geosciencaj studoj en Italio, Francio, Grekio, Kreto kaj Islando. Sekvis paleontologia reserĉado en la kuproardezo, pro kiu li 1997 ricevis la honoran doktorgradon *Dr.rer.nat.* de la Universitato en Marburgo.



**Bildo 2**: *G.Schaumberg*, La Ponto (*Die Brücke*), mikstekniko, 1999

Krom referenco al liaj du publikigaĵoj en SR 4/2001, mi kopias tri bildojn, kiujn la Magistrato de Eŝvego ekspoziciis (inter granda nombro de aliaj Ŝaŭmbergaj artaĵoj) de la 16-a de junio ĝis la 7-a de julio 2002 en historia urba salonego honore al la jubileulo.



**Bildo 3**: *G.Schaumberg*, Diablomuro (*Teufelsmauer*), mikstekniko, 1999

Dum sia longa vojiro de artisto, *Schaumberg* trovadis tute malsamajn alpaŝojn al sia bildmotivaro: post lia pli frua realismo sekvis lia surrealismo. Trans ĝi li iris al liberaj formoj de pentrado ĝis – nun en sia matura verkado – li revenas al objektivaĵoj. Kio tamen ĉiam restadis, estas lia rilato al la naturo, nome la rilato al ties strukturoj kaj formoj. Kiel aŭtodidakta erudito en geologio kaj paleontologio, li ne kontentigis sin per pentrista inspiriĝo, sed celis al scienca klarigado de problemoj. Por ilustri ĉion ĉi, perfekte servas liaj pentraĵoj "Kreskado"(blua/nigra), "La Ponto" (hele blua/bluverda) kaj "Diablomuro" (malhele bruna/griza).


Mi elkore gratulas kaj deziras, nome de la ISAE-membraro, oran vivo-vesperon kaj familian feliĉon. *R .Sachs*, ISAE-prezidanto



## Ankaŭ nia kara prezidanto jubileas

Vane li provis kaŝi sian aĝon antaŭ eventualaj junaj adeptinoj al ISAE…

### *Prof. Dr. Rüdiger Sachs: 75 !*



Li naskiĝis la 13-an de aŭgusto 1927 en *Völkershausen*, malgranda vilaĝeto en Heslando, Germanio. Post la lerneja tempo ekde 1933 sekvis malfacila vivoperiodo: jam la 17-a de februaro 1943 abrupte finis lian lernejan karieron, ĉar la klaso de la "Supra Lernejo por Knaboj" en *Offenbach / Main* eksiĝis. La 15jaraĝajn lernejanojn oni laborigis militgrave je kontraŭaviadilaj kanonoj kaj post du jaroj, nur 17jaraĝa, komence de 1945 soldatigis. La dorne aventuran etapon nia nuna jubileulo sukcesis fidele skizi en maldika libro "*Ich lief nur mit*" (Mi kuris nur kune). Lia atentotena priskribo estas aperinta jam en tri eldonoj: 1948, 1963, 1997. Treege leginda faktografio! Lastapaĝe eblas vidi foton el marto 1948: ĝojege bonvenigas panjo sian filon revenintan el la trijara ruslanda militkaptiteco…

La mirakle transvivinta junulo, post la maturekzameno (februaro 1949) dediĉis sin al la studado de la veterinara medicino ĉe la Universitato *Giessen*, doktoriĝis en 1955 kaj profundiĝis siajn konojn pri tropikaj malsanoj kaj parazitologio en la Universitato de Pretorio, Sudafriko. Kiel ŝtata veterinaro li deĵoris en Namibio, kiel esploristo en Tanzanio, kiel universitata docento en Kenjo. Sekvis tre ambiciaj esploroj en Niĝerio, Kamerunio kaj Burkinafaso. En 1979 li fariĝis direktoro de la esplorlaboratorio de Hamburga Tropika Instituto en Liberio. Lia specialiĝo kondukis lin al Eburio, Peruo, Gabono. *Sachs* habilitiĝis en 1978 kaj profesoriĝis en 1986 ĉe Naturscienca Fakaro de Universitato en Hamburgo.

Eblus verki monumentan romanon pri nia "Sakso", sed por tio necesus havi veran literaturan talenton, kapablan amuze trakti pri la pli ol 100 sciencaĵoj el la diversspeca esplorado en la tropika sfero. Ĉu kredeble, ke li krom ĉio ĉi siatempe sukcesis edziĝi en 1956 al *Christine von Kehler*? Ŝi, la bravulino, naskis al li tri filojn kaj du filinojn.